Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

n-ro 33

Januaro 1991

# La Merkato

## Enhavo:


Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj ......... 2
Saluton ..........................................dk 3
Komercdezira letero
de s-ro Stanislav BARTOVIC, Ĉeĥoslovakio ......... dk 3
Komercdezira letero de s-ro Ioan VAJDA, Rumanio ......dk 3
Malferma letero de la Prezidanto ...................FJB 4
IKEF-seminario en KCE La Chaux-de-Fonds ne okazos ...FJB 5
Diversaĵoj ............................ FJB/RR/dk 6
  Murcia, 12a - 14a de aprilo 1991: ..................dk 6
  Alvoko al ŝanĝota statuto ............... FJB/RR/dk 6
  Terminologia Centro de UEA (TEC) ...................RR 6
  Dankon ! ...........................................RR 6
  Studento el Tanzanio ...............................dk 7
  Eksterlandaj staĝoj ............................ dk 7
  IKEF-adresaro renovigita ...........................RR 7
  Supersignoj kun WordPerfekt 5.1 !? .................dk 7
Esperanta horloĝo .................................. dk 8
Internaciaj preuniversitataj somerkursoj en E-o ......dk 8
La Internacia Lingvo en la 2a Jarcento: ...........Ruig 9
KIEL FARI? .........................................FXG 12
VI HELPU MIN .......................................FXG 12
Internacia Komerco-Konsulta Grupo de
Tianjin-a Esperanto-Asocio, s-ro Wu Zhongtao, Ĉinio dk 13
Komercdezira letero de s-ro Princz OSZKAR, Hungario ..dk 14
Komercdezira letero
de nia nova membro S-ro Istvàn EÖRY .................dk 14
Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj! .............. RR/dk 16
Adresŝanĝoj; jen la novaj: ................ FJB/RR/dk 16
Forpaso de s-ro Voit ......................FJB/HW/RR/dk 16
Rajtoj de represo, Reklamtarifoj ktp. ...............dk 16

La Merkato (LM) estas organo de IKEF; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo:
Ĉe s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-W7580 Bühl 16, FR Germanio

Financa sidejo kaj membro-administrado:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

Redaktora sidejo:
Ĉe s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47 D-W6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

---

La jara membrokotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

Kontoj: Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c,
*aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

Perantoj:
*Francio*: S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)
*FR Germanio*: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-W7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
*Hispanio*: S-ro Pedro Antonio Macanás Valverde, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codorníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1250 ptas.)
*Hungario*: D-ro István Gether, Berényi ul.8 I/6, H-1027 Budapest
*Italio*: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
*Japanio*: S-ro Seikô Yamasaki, 185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
*Jugoslavio*: S-ro Sotir Taleski, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
*Svislando*: S-ro André Piérard, Chemin des Voirambeys, CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)
*Togolando*: S-ro Gbeglo Koffi, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Saluton

Estimataj gesinjoroj, karaj gelegantoj,

pro manko de spaco ni simple ĝoju pri la kreskanta kvanto da komercdeziraj leteroj kaj komencu jam en tiu ĉi paĝo.

Agrablan legadon deziras

Daniel König /dk

---

## Komercdezira letero de Stanislav BARTOVIC, Ceňoslovakio

S-ro Stanislav Bartovic deziras vendi medicinajn herbojn al germanio; verŝajne same pretas ankaŭ al aliaj landoj. Li deziras informojn pri laŭlandaj prezoj kutimaj kaj pri interesataj entreprenoj kaj privatuloj. Inter alie li ofertas (germanlingve en krampoj): **urtica dioica** (Große Brennessel), **agrimonia aupatoria** (Odermennig); **matricaria chamomilla** (Echte Kamille). Interesatoj sin turnu al

S-ro Stanislav Bartovic
Vážska 3560
92101 Piešťany
Ceňoslovakio

/dk

---

## Komercdezira letero de Ioan VAJDA, Rumanio

El la letero de la 28a de oktobro 1990
"... Mia amiko kaj mi pensis ke ni devus profiti de la ŝanĝoj kiuj okazas en nia lando. Ni ambaŭ havas hungaran naciecon. Ni ŝatus fondi, kune kun okcidenta interesata firmao, komunan entreprenon en nia lando. Ni pensas pri naturaĵindustrio (biero, refreŝigiloj ktp.) aŭ io alia, por kio oni povas trovi la krudmaterialojn en nia lando, aŭ oni devas importi minimumon."
Ili pretas komuniki kaj Esperante kaj angle, germane kaj france. (Supozeble oni scipovas ankaŭ la romanian kaj la hungaran lingvon.) Oni petas transdoni tiun-ĉi alvokon al interesatoj/firmaoj.

S-ro Ioan Vajda,
B-DUL GARII NR. 30 A
BL. 225 A. SC. B. AP.18
2200 BRASOV, ROMANIA, (Rumanio)
Tel. (921) 2 48 12

/dk

## Malferma letero de la Prezidanto

Estimataj gekolegoj,

Nova jaro komenciĝis. Ni certe demandas nin, ĉu ĝi alportos progreson por la internacia lingvo ĝenerale kaj por IKEF speciale. La gravaj politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo liveras riskojn por nia afero - aparte elfalo de la ĝisnuna ŝtata apogo en tiuj landoj -, sed ankaŭ ŝancojn, kiuj montriĝas en malfermo de la limoj, multobligado de kontaktoj kun homoj el tiu mondoparto kaj komercaj interŝanĝoj.

Ĉiam mi rekomendis, ke ni koncentru niajn fortojn al farebla agado. Tio ĝenerale validas ankaŭ por la Esperantistaro entute. Miaopinie ekzistas kelkaj Esperantistaj instancoj/aferoj, kiuj estas nepre konservindaj kaj subtenindaj. Al tiuj apartenas ekzemple la revuoj MONATO kaj EL POPOLA ĈINIO, la turisma entreprono ESPERANTOTUR kaj la Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La lastan mi vizitis fine de januaro por prepari la organizadon de nia Ekonomia Seminario (Simpozio) de la 31a de majo ĝis la 2a de junio ĉi-jare. Ni ja volis okazigi la simpozion precipe t i e, por subteni tiun Esperantistan institucion. Ili disponas en sep domoj pri studĉambro, dormĉambroj, kuirejo/gastejo k.a., t.e. ke oni povas pasigi semajnfinan aŭ tutsemajnan staĝon laŭ la moto "Matene labori, posttagmeze promeni en la bela ĉirkaŭaĵo".

Montriĝis ke la Esperantistaro ne sufiĉe uzis tiujn eblecojn en la pasinteco. Sekvo estas financa kolapso, kiu kondukas al tio, ke KCE devos vendi minimume kvin el la sep domoj; eĉ jam nun la dormdomoj estas plenigitaj de fuĝintoj kaj azilantoj laŭ ordono de la urba administrado. Do la sorto de KCE estas necerta. Ĉiukaze ĝi neniam pli disponos pri tranokteblecoj kaj gastejo. Se oni entute provas aranĝi staĝojn, tiam la partoprenontoj devas loĝi en hoteloj kaj manĝi en publikaj restoracioj.

Mi revenu al neceso pri koncentriĝo. De IZF Institut für Zielforschung (Instituto por celesploro) en Berlin mi ricevis kopion de korespondado kun Germana Esperanto-Asocio. IZF faris por GEA esploron pri la plej efika strategio disvastigi Esperanton. El tio montriĝas ke IZF rigardas



pli grava la aplikon de Esperanto en scienco kaj tekniko ol en literaturo kaj beletro, plie ankaŭ en ekonomio kaj komerco (li aparte nomas IKEF-on ^ce tio), kaj internacian tradukservon kia Weidmanns Mondo-Servo, Schaffhausen, Svislando, ĝin ofertas.

Similan opinion esprimas la vicprezidanto de la ĉeĥa Esperanto-Asocio, s-ro Vlastimil Koĉvara per la vortoj "La integriĝon de Eŭropo motoras ekonomio, ne filozofio" (vidu revuon "Esperanto", novembro 1990, n-ro 1019, paĝo 206). El letero de s-ro Wang Peiyan, Ĉinio, publikigita en "Esperanto Aktuell", organo de GEA, n-ro 90/4, oni povas legi, ke laŭ li ĉefe necesas i.a. "kompensaj komercoj", "transdono de sciencteknikaj fruktoj", "prilaboroj de materialoj inter koncernaj entreprenoj".

Do ili diras ankoraŭfoje, kion ni jam scias, nome kian gravan rolon IKEF povus ludi por Esperanto. Miaopinie neniu alia el la multaj fakaj asocioj de UEA povas superi nin en tio. Ĉu ni ĉiam konscias pri tio?

En la lastaj du numeroj (n-roj 31 kaj 32) de La Merkato troviĝas raportoj kaj proponoj pri modele efika agado en la senco de IKEF. Se ĉiu el niaj preskaŭ cent membroj dum la nova jaro 1991 kaptus tiujn ideojn kaj ekagus tiusence, tiam IKEF fariĝus lancopinto por antaŭenigi Esperanton.

*Franz Josef Braun*

## IKEF-seminario en KCE La Chaux-de-Fonds ne okazos

En "La Merkato" n-ro 32, paĝo 10, ni estis anoncinta Seminarion de la 31a de majo ĝis la 2a de junio 1991 en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Bedaŭrinde pro gravaj financaj problemoj, KCE ne plu disponas pri dormĉambroj kaj kuirejo/gastejo. Ni devus tranokti en hoteloj kaj manĝi en publikaj restoracioj. Tio certe ĝenus la kutiman etoson de Esperanto-aranĝo kaj ankaŭ estus pli multekosta.

Tial ni decidis nuligi la seminarion. Ni bedaŭras ĉi tiun evoluon, sed ni esperas je via komprenemo.

/FJB

## Diversaĵoj

**Murcia, 12a - 14a de aprilo 1991:**

Komisiono pri ekonomio kaj komerco renkontiĝos ĉe la Kongreso de Esperanto en Murcia (urbo en Alcanterilla). Ankaŭ eksterlandanoj estas invitataj; por ili la aliĝo estos senpaga. Interesatoj sin turnu por pliaj informoj al la IKEF-peranto por Hispanio,

S-ro Pedro Antonio **Macanás Valverde**,
Tel.(hejma): 34.68.231219.

/dk

**Alvoko al ŝanĝota statuto**

En LM n-ro 32 ni alvokis la membraron esprimi modif- aŭ ŝanĝdezirojn rilate al nia statuto. Tiucelaj respondoj vi sendu al nia ĝenerala sekratio/prezidanto:

S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8,
D-W7580 Bühl 16, FR Germanio

FJB/RR/dk

**Terminologia Centro de UEA (TEC)**

Kvankam TEC jam ekzistas de multaj jaroj, ĝis nun apenaŭ haveblas iuj rezultoj. Kaŭzo de tio i. a. estas manko de programo kiu kapablas pritrakti multlingvajn (do ankaŭ Esperantajn kaj orienteŭropajn) tekstojn.

S-ro Jan **Pospisil**, estraro de TEC, anoncas ke baldaŭ haveblas programoj (nunmomente fintestataj) kiuj solvas tiujn problemojn. Tiuj programoj ankaŭ estas interesaj por la Esperantista publiko ĝenerale.

Temas pri ***Multi Alphabet***, kiu ebligas enklavi kaj surekranigi ĉe personaj komputiloj (kun EGA- aŭ VGA-karto) diakritajn signojn laŭ ISO-normo 6937/2-1983 (E). Dua programo ebligas printi tiujn signojn per printilo kun "download"-kapablo.

La programoj kostos po 80 DEM (germanaj markoj). Distribuonto estas s-ro Jan **Pospisil**, Firmao Rapido, Leningradska 3112, CS-27204 Kladno 4.

/RR

**Dankon !**

La kasisto dankas (nome de IKEF) pro iliaj donacoj dum la pasinta jaro al: H. Buhl, Komerca Cambro Bar-le-Duc; M. Basso; G. Pirlot kaj F. Schneider.

/RR



**Studento el Tanzanio**

S-ro Kabuche **Nyinyimbe**, serĉas kontakton al Esperantistoj kiuj agas komerce kun Esperanto. Li estas 24-jaraĝa kaj praktikas pri komerco kaj ekonomio en la regiono de Tabora.

S-ro Kabuche **Nyinyimbe**,
c/o Azarel Nyinyimbe, P. O. Kesto 3, Igunga,
Tabora - Tanzania

/dk

**Eksterlandaj staĝoj**

S-ro Janek **Bender**, studento de "ekstera komerco" el Reutlingen (50 km sudoriente de Stuttgart, Germanio) serĉas ejon por eksterlanda staĝo. Li eklernis Esperanton 1983 kaj krome disponas lingvokapablon en la germana (patrina lingvo), angla, franca kaj hispana. Eksterlandaj staĝoj estas devigataj je lia studplano. La planita daŭro: 26 semajnoj; liaj specialaj interesoj: "financoj, eksporto, datumprilaborado kaj marketingo". Informojn kiuj direktiĝas al tiu celo vi estas petata komuniki al

S-ro Janek **Bender**,
Senefelder Straße 19,
D-W7312 Kirchheim/Teck, Germanio

/dk

**IKEF-adresaro renovigita**

Por plifaciligi la membroadministradon kaj informadon la donitaĵoj de la IKEF-membroj nun estas transigitaj al nova komputilo. La adresoj en nova formo verŝajne unuafoje aperos sur la kovertoj en kiuj LM n-ro 33 estos sendata al vi. Bonvolu komuniki erarojn al Roland **Rotsaert**.

Bonvolu ankaŭ atenti la supran linion de la adresetikedo: tie videblas ĝis kiu jaro via IKEF-kotizo validas. La kasisto antaŭdankas pro frua pago de la kotizoj por 1991. Eble vi profitu de via kotizpago por mendi Komercan Terminaron aŭ Identecŝildaron.

/RR

**Supersignoj kun WordPerfekt 5.1 !?**

Alvoko: Kiu jam spertas kontentigajn rezultojn kun WordPerfekt 5.1? Bonvolu komuniki tion al la redaktoro aŭ S-ro Roland **Rotsaert**.

/dk

## Esperanta horloĝo

En la revuo **El popola Ĉinio** troviĝis artikolo kun la titolo "Brakhorloĝo kun verda stelo" (n-ro 11/1990). Temas pri ĉina firmao kiu produktas horloĝojn kaj nun inter alie tiajn kun verda stelo en ĝi. Tiu ne estas hazarda. Krom la stelo ĝi enhavas desegnaĵon de nia terglobo kaj malgrande enskribita la vorto Esperanto. Fakte: belaspektas; mi persone jam mendis. La iniciatinto nomiĝas Zhao Qiang. Laŭdire, urĝema junulo kiu laboras en la vendejo de la brakhorloĝo fabriko de Qingdao. La prezo estas fiksata je $ 15. US (usonaj dolaroj) inkluzive la sendokostojn. Disponeblas diversajn: por viroj kaj por virinoj. Interesatoj sendu siajn mendojn (kun monbiletoj en registrita letero) al

Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 825
CN-100037 Beijing, Ĉinio

/dk

## Internaciaj preuniversitataj somerkursoj en Esperanto

La kurso celas munti periodaj **Internaciaj preuniversitataj somerkursoj en Esperanto**. La unua sesio okazu en la jaro 1993, paralele al la 78a Universala Kongreso de Esperanto en Valencia, Hispanio. La projekto jam estas en preparo. La kadro por tiu libervola E-kurso donas la **INSTITUTO POR LINGVOJ** de la Universitato de Santiago de Compostela kunlabore kun la **HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**.

La direktoro de la konsilantaro de la hispana ministerio pri edukado kaj scienco jam esprimis sian intereson kaj subtenas la projekton per ektserordinara kaj unufoja monhelpo da 200 000 pesetas.

El la unua informilo:

"Institucioj de la uzantaro de Esperanto al kiuj estas sendita tiu ĉi unua numero de la informilo, kaj de kiuj ni petas diskonigi la projekton al siaj membroj kaj publikigi pri ĝi en siaj organoj.

Ni danke ricevos de tiuj kaj alicelaj institucioj, ankaŭ de iliaj membroj aŭ de aliaj personoj, ĉian sugeston, proponon, kunlaboron aŭ helpon por la bona disvolvo de la projekto, tiel en la propra lando aŭ institucio, kiel laŭ ĝenerala vidpunkto.

Ni dankos, por la kazo de ofizialaj kaj similaj skribaĵoj, ke la nacilingvan tekston akompanu traduko en Esperanto. Ni dankos ankaŭ, ke privatajn leterojn ĝis nun senditajn al ni, oni laŭeble ŝanĝu al oficialaj (de universitatoj, administraj instancoj, kulturaj asocioj, k.s.).



Ni petas, ke ĉiuj tiaj leteroj ne plu estu sendataj al la iniciatinto de la projekto, sed al adreso ĉe la titolo de tiu ĉi informilo."

Sekvas nun, tie en la koncernata informilo, relative longa listo da Esperantaj organizoj en kiu cetere ankaŭ IKEF estas menciata. Por pliaj informoj aŭ viaj laŭsencaj sugestoj direktiĝu vin al

Curso de Esperanto
Instituo de Idiomas
Praza de Mazarelos, s/n.
E-15703 Santiago de Compostela
Hispanio/España

/dk

## La internacia Lingvo en la 2a Jarcento:

**Post evoluo de Esperanto nun Esperanto por la evoluo.**

1. La esenca valoro de Marketing (merkatumado kaj surmerkatigo).

1.1. La tutmonda enkonduko de Esperanto estas grave handikapita pro la diletanta surmerkatigo en la estinto. Mallonge ni simple povas konstati, ke oni misprezentis la Internacian Lingvon ĉe ĝia akcelado.

Ankaŭ en la komerco tiaj malsukcesoj okazas. Bona ekzemplo estas la enkonduko de la nederlanda plenaŭtomata aŭtomobilo "DAF-Variomatic". La fabriko prezentis tiun nederlandan inventon kiel la aŭto kiun ec maljunulinoj povus manipuli. Sed la merkato tiel efikis, ke la aŭto konatiĝis kiel pormaljunulina transportilo.

Do plej multaj potencialaj aĉetontoj (grandparte la viroj), ne volante ricevi tian imagon, ne aĉetis tiun aŭton.

Nun, ĉ. 30 jarojn poste oni reprezentis la saman aŭtomatan sistemon, kvankam modernigitan, en bona merkatuma maniero kaj diversaj mondkonataj aŭtofabrikoj batalas por la akirado de licencrajto.

1.2. En Esperantujo propagandaj teksteroj kiel "helplingvo", "artefarita" kune kun flirtado de "verdaj standardoj" kaj disŝutado de enormaj verdaj steloj multe malhelpis la sukceson de la internacia lingvo.

Sed ni ne povas malaperi dum 30 jaroj kaj poste reaperi en nova vesto sub nova nomo.

Ni ne povas simple forĵeti la estinton.

Ni perdis bonŝancan eblecon kaj devos vivi kun nia (ankoraŭ vivanta) historio.

2. Neceso de politika iniciato

Flanke de tiu mismerkatumado ni devas konstati, ke estas malfacilege, se ne maleble, kiel privata asocio sen iu registara puŝforto, tutmondigi projekton.

Eĉ por tutmondaj organizoj agnoskitaj de la plejparto de la registaroj en la mondo kiel la U.N.-organizoj, tio estas malfacila afero.

Pensu ekzemple pri agadoj kiel "la jaro por la virino", "la jaro por la infano", "la jardeko de la akvo", "Habitat" k.a.

3. Vendologio ankaŭ por la Internacia Lingvo

3.1. Ni vivas en nuntempe rapide ŝanĝiĝanta mondo. Produktoj kaj projektoj, ĉu komercaj ĉu idealismaj estas sub forta influo de tiel nomataj makro-efikoj.

Eĉ en la komerco nur antaŭ mallonge oni konsciis pri tiuj makro-efikoj kaj komencis akordigi la merkatumadon laŭ ili. Antaŭe oni apogis ĉefe sur la meso-kaj mikro-efikoj (sinteno kaj opinio de iu grupo, kategorio regiono de homoj). Nun oni pli kaj pli rekonas ankaŭ la efikojn de la (inter-)naciaj politikoj, soci-ekonomikaj eblecoj, financaj mezuroj, registaraj strategioj, medioprotektaj reguloj ktp.

3.2. Ni devas konfesi, ke ĝuste Esperanto estas sub grandega influo de tiuj makro-efikoj. Guste pro tio neniu povas antaŭvidi kiel tiuj makro-influoj helpos aŭ malhelpos la tutmondan enkondukon de la internacia lingvo estonte.

Sed ĉiu komprenos, ke estas kompleksa afero kiun ni, certe ne kun nia historia ŝarĝo, povos lasi al bonvolaj amatoroj. Kaj malgraŭ (aŭ ĉe neadaptiĝo: kune dank'al) tio ne eĉ rajtas pridubi ĉu privata organizaro kiel UEA kun siaj landaj kaj fakaj asocioj iam sukcesos en tiu giganta tasko sen helpo elekstere.

En la merkato validas la aksiomo, ke liveristo devas kontentigi la bezonon de siaj klientoj.

Se tia bezono ne klare aŭ ne sufiĉe ekzistas, oni devas krei au stimuli tiun bezonon. Tio same aplikiĝas al la Internacia Lingvo.

Por enkonduki Esperanton sukcesplene ni ne devas serĉi kie tiu "produkto" estas bezonata kaj tie ni devas stimuli la bezonon. Krome ni devas esti pretaj adapti la pakumon de la produkto laŭ la gusto de la uzonto. Car tia laboro estas jam granda peno (vendo de servo, teĥnologio, ideo estas pli malfacila ol de konkreta produkto, varo), ni kompreneble serĉu tian regionon kie la rezisto estas malplej granda.

Do same kiel en komerco ni esploru la vendomotivojn kaj la vendorezistojn. Rezistoj povus esti: antaŭjuĝo kaj nescio, malĝusta reputacio (vidu sub 1.1), inerto, politiko, timo.



Kriterioj por sukcesa enkonduko estas do:
- bezono de neŭtrala internacia lingvo;
- apogo de registaro(j).

4. Ĉu la fina venko komenciĝos en la tria mondo?

4.1. Miaopinie momente estas unu tereno kie la cirkonstancoj estas relative favoraj, nome en la evolua kunlaboro kaj precipe en la transdono de teĥnologio kaj "s+s" (scio kaj sperto = "know-how").

Evolulandoj emas ne plu akcepti okcidentan kulturlingvon pro timo de lingva, kultura aŭ politika influoj aŭ superrego, aŭ pro ekskoloniaj kontraŭsentoj, kaj pro plikonsciiĝo de la propra identeco.

4.2.1. Unue necesas serĉi la landojn kie estos malplej da rezisto kontraŭ Esperanto, kie la registaro emas apogi la uzon de la Internacia Lingvo (ne nur en la unua ŝtupo, ĉar ĝi povus tro facile malaperi post revolucio aŭ elektoj, sed ankaŭ en la dua, pli oficista ŝtupo). Kune kun lokaj Esperantogrupoj ni inventaru la eblecojn kaj dezirojn por elekti la plej bonan oportunon.

4.2.2. Tiam UEA kun landaj kaj fakaj asocioj, en kunlaboro kun profesiuloj ne-esperantistaj kaj lokaj/landaj ĉi-rilataj ne-esperantistaj organizoj ellaboru agadplanon por promocii la Internacian Lingvon en la evoluprogramo de evoluantaj ŝtatoj.

4.3. Se registaro postulus en la negocoj pri evoluprogramoj, ke teĥnologi- kaj s+s-transdonoj kaj trejnadoj skribe kaj buŝe okazu ĉu en sia nacia ĉu en la internacia lingvo, tio kondukus al la aperigo de sciencaj kaj teĥnikaj verkoj en la Internacia Lingvo kaj al lernado kaj aplikado de ĝi ĉe instruantaj kaj ricevantaj fakuloj/evolulaborantoj.

Tio estos la komenciĝo de neĝbula efiko.

5. Kiel pluen?

Ni nur ne pensu, ke la sukceso estos tuja.

Sed ni ja konsciu, ke evolucio estas pli daŭra ne nur ol revolucio sed ankaŭ ol era kaj disa agado. Cel-direkta pafo estas pli celtrafa ol dishajla pafetado.

Kiu kuraĝos kontribui al la kompilo de laborplano?

Bonvolu sendi viajn komentojn, opiniojn, ideojn al la aŭtoro de ĉi-tiu artikolo:

*Ing. Kees RUIG*
Groesbeekseweg 53
NL-6581 BJ MALDEN
N e d e r l a n d o

## KIEL FARI?

Por ĉiu agado necesas plano. Tiu-ĉi devas montri:

la strategion,
la taktikon *kaj*
la rimedojn.

La strategio estas tre certa: uzigi la internacian lingvon en la ekonomia kampo, en la komerco.

La taktiko necesas elektojn. Fakte, eĉ per gravaj monrimedoj, ne eblas atingi ĉiujn celojn, kiuj estas interesplenaj. Laŭ mia opinio, temas trovi reton de oficistoj, kiuj interŝanĝas profesiajn informojn, kaj fine de la komerca ĉeno, interparolas kun la klientoj uzante la patrinan lingvon. Mi pensas al turisma internacia organizo, kiel HAVAS aŭ COOK. Se tiu-ĉi prenus Esperanton kiel lingvon por komuniki interne de sia reto, ĝi kapablus ŝpari multe da mono por instrui siajn oficistojn, aŭ ĝi dungus pli facile homojn kaj la mono mankas ĉiam en la firmaoj!

La rimedojn ni devos krei; temas pri modernaj iloj por instruado de Esperanto: lernolibroj, sonbendoj, videobendoj, lernoludoj, ktp., ... same kiel por la aliaj. Do estas ankoraŭ argumento pri ŝparo por la firmaoj.

Proponoj. Konsiderante la turisman kampon, ni povas konstati ke funkcias tra la mondo pluraj firmaoj ligitaj al Esperanto; memore mi citas: **Monda turismo** en Bruselo, **Esperantotur** en Pollando, **Traduk-servo Esperanto** en Londono; estas ankaŭ hoteloj, kampadejoj en diversaj landoj. Do eblas krei pripensan grupon ĉirkaŭ la profesiuloj por interŝanĝi sentojn kaj ideojn por prepari argumentaron. Ni serioze kaj profesie agu en Esperantujo antaŭ ol babili ekstere!

*François Xavier Gilbert*

## VI HELPU MIN

Ek de du jaroj, mi instruas la internacian lingvon Esperanto en la komerca lernejo de la komercoĉambro de Meuse (Francio). Fakte, kadre de la "institucio por fortigi la vendistoj" (mallongige I.F.V.) grupo de 14 gestudentoj



ĉiujare lernas la Esperantan lingvon dum 40 horoj. Estas gejunuloj 20-25 aĝaj. Kompreneble, ili lernas ankaŭ la anglan, sed malfacilas al mi klarigi la konkretan utilecon de Esperanto. Post duona daŭro de la kurso, mi donas al ili adresojn de membroj de IKEF, plenkreskuloj, kiuj afable konsentis korespondi kun ili; sed skribi estas abstrakta maniero de kontakto ... Nur kelkaj el ili uzas tiun eblecon konatiĝi kun Eksterlandanoj.

Do, ŝajnas al mi ke estos pli interese por ili interŝanĝi pripensojn kun samaĝaj gestudentoj de nefranclingva lando. Fakte, se ili konstatus ke ankaŭ en alia lernejo oni instruas Esperanto, estus por ili pruvo de la taŭgeco de la internacia lingvo.

La peto estas: ĉu vi kapablos trovi lernejon (komercan aŭ ne) kiu konsentos ĝemeligi kun tiu de Bar le Duc? Vi serĉu, serĉu, serĉu, kaj mi antaŭdankas vin.

*François Xavier Gilbert*

## Internacia Komerco-Konsulta Grupo de Tianjin-a Esperanto-Asocio

Per letero de la 15a de januaro 1991 invitis la Internacia Komerco-Konsulta Grupo de Tianjin-a Esperanto-Asocio al partopreno ĉe la "La Tianjin-a 1991-jara Importo-eksporta Komerco-Foirego de Ĉinio" kiu okazas je la 1a ĝis la 10a de marto 1991. Malgraŭ tio ke la informo venis tro malfrue por ĉi-jara partopreno de iu membro, mi volonte aperigas la okazaĵon. Eventuale interesiĝas vin la afero por la venonta jaro 1992. Lastjare ekspoziciis tre sukcese pli ol 1600 partoprenantojn el diversa landoj. La tieaj interparoladoj rilatas al importado/eksportado, prilaborado de materialoj, muntado de pecoj, kompensa komerco, eninvestado kaj meminvestado de fremdlandanoj. Por akiri formalan invitilon kaj se vi havas demandojn pri detaloj, vi kontaktu

S-ro Wu Zhongtao*
CHINA CHAMBER OF INTERNATIONAL COMMERCE
TIANJIN CHAMBER OF COMMERCE
34 You Yi Road, HeXi District Tianjin China
Postcode: 300061

Hejma tel: 762160
Tel:34.1800 34.4003
Cable: CCPIT TB
Telex: 23261 CCPIT CN
Fax: (022) 31.9797

*S-ro Wu Zhongtao scipovas Esperanton. /dk

## Komercdezira letero de s-ro Princz OSZKAR, Hungario

En Hungario eklaboris la nova tripersona firmao **Peranto**. Ili okupiĝas pri **eldonado** de libroj kaj revuoj kaj **instruado** de fremdaj lingvoj. La entrepreno jam akiris la permeson internacie komerci (validas por preskaŭ iu ajn varo kaj spiritaj produktaĵ). Ili ŝatus komerci uzante Esperanton. Pliaj informoj ĉe Princz Oszkár , H-1136 Budapest, Sallai u. 4.

La entrepreno firmas (havas la adreson):

> PERANTO Kulturális, Szolgántó, BETÉTI TARSASAG
> Adószám: 2 4 4 3 2 9 8 4 1 1 3
> H-1136 Budapest, Sallai Imre u. 4., Hungario
> MKB RT.: 203-88883/1012-0028

/dk

## Komercdezira letero de nia nova membro s-ro Istvàn EÕRY

"Estimata sinjorino, sinjoro!

Verŝajne Vi jam estas iom informita pri nialandaj pozitivaj evolupaŝoj (politikaj, ekonomiaj) post la tn. "socialisma planekonomia" epoko, pri sistemoŝanĝo kun la realigado de espereble vera merkatoekonomio, kie trovos sian justan lokon ĉiuspecaj entreprenemuloj.

Mi estas profesie ekonomisto kaj sistemoorganizanto kun 25 jara maŝinindustria organizadpraktiko. Ĉi-jare tamen mi volas ekkomenci mian vojon per tre etaj paŝoj al tiu mementreprenemula vivo. Unue ankoraŭ ne havante kalkuleblan monkapitalon, mi povas komenci nur kiel peranto.

Tiel ĝis nun mi eĉ ne malvastigis mian intereson al iu speciala temaro, vararo, sed volonte mi moviĝos komence en diversaj ebenoj de eblecoj.

Kion mi scipovas jam nun oferti iom pli konkrete?

- Serĉado/perado de hungaraj aĉetantoj, liverantoj, fabrikantoj de iu konkreta varo, vararo, teknologio, ktp.
- Helpante tion mi volonte organizos celtrafajn renkontiĝojn, eble kun celtrafaj ekspozicieblecojn kun taŭgaj varoj, reklamoj kaj helpas trovi hungarlandan eblecon en foiroj.
- Volonte mi aktivados en serĉado/perado de partneroj ambaŭflanke por ebla fondo de komuna




... jam de longe konas
la fabrikantojn de la altkvalitaj produktoj
kiuj nur en Svislando ekzistas
kaj kiujn vi ne ankoraŭ trovis

... aŭ elektronikaj eroj
... aŭ vinoj
... aŭ ŝipoj
... aŭ bankaj servoj
... aŭ ... ??? ... ĉu ne ?

*COVALEX S.A.*
Chemin des Voirambeys
CH - 3974 MOLLENS
(Svislando)

Profesie - Fidinde - Diskrete

eldonas komputerprogramojn (IBM aŭ kongruajn) ŝanĝas, adaptas elektronikajn informojn el unu al alian sistemon (diskoj - disketoj)

[illegible] / [illegible]
[illegible] / [illegible]


entrepreno, sed interesus min la reprezentado en Hungario de iu eksterlanda firmao/interesulo.

Afable mi petas iuspecan reagon, petojn, proponojn, ktp., kaj okaze de neintereso de adresito mi petas la afablan transdonadon al iu loka, regiona komerckamera, industriakamera medio, aŭ rekte al iu interesulo.

En la espereblaj kontaktoj, reagoj mi preferus nian karan Esperanton, sed se estos bezonate mi volonte uzos la germanan kaj kun helpo la anglan, aŭ iu ajn alian lingvon.

Gyor, dato laŭ la poŝtŝtampilo *(januaro 1991)*

Estimplene mi salutas Vin atendante Vian afablan reagon:

S-ro Istvàn Eõry,
H-9023 Gyor, Munkasõr Str. 36 fsz. 3.
Hungario - Telefono: 36.9624451"

---

En persona letero S-ro Istvàn Eõry, aludis ke li plej volonte akceptus peradmendojn en la <u>ferprilabora</u> aŭ/kaj <u>lignoprilabora</u> kampo.

/dk

Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!

S-ro Raymond Gueguen, (IKEF 113), Résidence Jeanne d'Arc, 4D rue des Soeurs de la Riviére, F-8700 Limoges, Francio

Esperantista Grupo Welkenraedt, (IKEF 114), rue de la Colline 16, B-4840 Welkenraedt, Belgio

S-ro Inĝ. Volker Hank, (IKEF 115), Lindenstraβe 2, D-W6425 Lautertal-Hörgenau, Germanio

S-ro Takasi Kawai, (IKEF 116), 463 Nagoya, Moriama-ku, Benten ga Oka, Oomoridai 2-105, Japanio

S-ro Tianyi Wang, (IKEF 117), Xi'an-a Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74hao, CN-710054 XI'AN, Cinio

S-ro Akiko Itagaki, (IKEF 118), 982 Sendai, Taihaku ku, Kongôzawa 3-9-48, Japanio

S-ro Istvàn Eõry, (IKEF 119), Munkasõr Str. 36 fsz. 3, H-9023 Gyor, Hungario

RR/dk

---

Adresŝanĝoj; jen la novaj:

S-ro Michael Herrmann, (IKEF 53), In der Aub 1, D-W7732 Kappel, Germanio

D-ro Istvàn Gether, (IKEF 7), Palóc u. I., H-1135 Budapest XIII, Hungario

FJB/RR/dk

---

Forpaso de s-ro Voit

Nia Dumviva Membro Willy Voit (IKEF 17) forpasis je la 9a de oktobro en la aĝo de 77 jaroj. Ni funebras pro kolego kiu aliĝis al IKEF an la komenca stadio de nia fakgrupo.

FJB/HW/RR/dk

---

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

---

La rajtoj de represo estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

---

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

---

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk